

Tagiĝo 11

*Neregula cirkulero de
Esperanto-Junularo
en ĈRS.*

*Eldonas Osvětová beseda,
záj. kr. Esperanto, Opava*



KARAJ LEGANTOJ,

Post longa paŭzo vi ricevas la 11-an numeron do Tagiĝo. La silento estis plej multe kaŭzita de teknikaj malhelpoj. Sed ni aĉetis la propran ciklostilon kaj tial ni esperas, ke venontaj numeroj de nia centra cirkulero aperados sen malfruiĝo.

Hodiaŭa numero estis unua en nova laborjaro, kiun ni komencis post finiĝo de ĉi-jara konferenco. La kunsido montris multajn mankojn en nia movado, sed ankaŭ akcentis multajn sukcesojn, kiujn ni per nia entuziasmo kaj obstino atingis.

La danko apartenas al ĉiuj grupoj, kiuj en pasinta jaro ne "mortis", sed kreskis kaj akiris novajn samcelanojn por nia movado. La arda danko apartenas precipe al ĉefdelegito de tutŝtata junular-organizo al samideana Jan Werner. Kiel redaktoro de Tagiĝo mi volus esprimi al Honza Werner korajn dankojn pro lia oferemo, zorgado pri movado, sed antaŭ ĉio pro lia modela kunlaboro kun redakcio de Tagiĝo. Al li apartenas granda parto de merito, ke nia movado en lasta jaro progresis tiom antaŭen, ke ni povis okaze de kunsido tutŝtata konstati, ke nia Junularo fakte agis. Espereble J. Werner, eĉ kiel eskprezidanto restos ĉiam por niaj funkciuloj sincera konsilanto.

Kaj nun ankoraŭ ion el la konferenco.

Ĝojigaj estis la raportoj de delegitoj el Pĕřerov, Most, Lanškroun, Brno kaj kelkaj aliaj, sed ni estus ankaŭ ĉeestantoj de raportoj malpli kontentigaj. Kial do vi ne raportis pri la malfacilaĵoj estantaj la kaŭzo de via malfacila laboro? Kial vi nur per kelkaj formalaj frazoj transiris tiel gravajn problemojn? !? ! Nia deziro, ke la konforencoj fariĝu loko de interŝanĝado de spertoj, la loko, kie unu grupo povus konatigi kun labormaniero de la alia - restos versinile vana. Tiamaniere kompreneble niaj kunsidoj ne plenumoas siajn plej ravan taskon. La konferenco devas ne nur konstati, sed ankaŭ serĉi la novan vojon, konsili, helpi al grupoj trovi la plej taŭgan metodon de agado de unuopaj lokoj.

Sed la problemo, aspektigi tiel niajn kunvenojn estas plene en la manoj de ĉiu loka delegito. Ĉi tio ankoraŭ rimarko!

Ĉiu grupo havas sian delegiton, kiu akcentinte la funkcion akceptis ankaŭ la taskon kun la funkcioj ligitaj.

La ĉefa tasko de delegito restas regula sendado de raportoj al redakcio de cirkulero Tagiĝo. Sed kia estas la efektiveco?

Kion faras la delegitoj, kies nomo de grupo aperis sur la paĝoj de Tagiĝo neniam aŭ malmultfoje?

Kiel do ili plenumus sian taskon? Eble ili opinias, ke sendadi al Tagiĝo ĉiam la samajn informojn estas tro formala.

Ni respondos: Jes, sendadi nur la samajn raportojn estas formalece, sed estas tute en viaj manoj, ke la raporto ne estu ĉiam egala. Laboru pli vige, solvu ian problemon, kaj vi ekvidos la vastan kampon de la ebleco antaŭ vi!!!

Estas memkompreneble, ke la "Formalaĵoj" ne interesas ceterajn samideanojn, do klopodu, por ke viaj raportoj estu ne senviva dokumentado sed efektiva priskribo de viaj sukcesoj eĉ malhelpoj.

Same kiel mi devis riproĉi al multaj delegitoj la malfervoron, same estas necese laŭdi la delegitojn de florantaj grupojn, kiuj regule informis nian legantaron pri la loko laboro.

Ni esperu, ke tiurilate nia laboro estos ĉijare pli sukcesa!

Ankaŭ plibonigon ni atendas en la ĉeĥo-slovakaj esperanto-rilatoj. Sincere ni salutas la proponon de s-ano Škvrna pri pli intima kunlaboro inter ambaŭ sekcioj, helpo de du kurieroj, tiucele elektitaj. La tribunuo pro ĉeĥo-slovakaj rilatoj estos Tagiĝo kaj male la Juna voĉo, kiu denove komencis aperadi kaj kies abonon ni arde rekomendas! Por multaj grupoj ĝi estas krom Tagiĝo sole atingebla esperantaĵo kaj ĝi ofte povos helpi al vi prepari la programon por viaj kunvenoj. Adreso por aboni bultenon Juna voĉo estas: Milan Neubeler, Širokého 156, Poprad 4.

Venas ankaŭ la aŭtuno, tempo plej taŭga, dum kiu ni kutime aranĝas la kursojn. Estas necese per celtaŭga maniero fari la varbadon de novaj adeptoj - sed kio estas plej grava: el ĉi tiuj interesuloj ankaŭ eduki sindonajn esperantistojn!

Ĝi estas la tasko de kursgvidantoj! Tiu devas havi ne nur la spertojn kaj pedagogiajn kapablojn, sed ankaŭ amon al la lingvo, al lernantoj, kaj esti kapabla refuti la ordinarajn kontraŭdirojn, kiuj en kurso estas neeviteblaj, ne iel dogme sed per amika interparolado kaj klarigo de la aferoj.

Rekomendinda estas ankaŭ kunigadu de la lernado kun kultura laboro, de multaj grupoj ĝi montris sin konvena.

Dum la kunvenoj eĉ de komencantoj parolu pri la esperanto historio kaj menciu ion el nia riĉa literaturo kaj tiel agante vi kontribuos al edukado de la vera spirito, kiun dovas nepre rugi niajn rondetojn.

Ne toleru la sendisciplinon, ĉar ĝi estas kaŭzo de la multaj disfaloj de la kursoj, preparu vin ĉiam precize por la kurso, por ke ĝi ne estu enua! Plenumante ĉi tiujn supozojn vi atinos brilajn sukcesojn.

Volante jam finigi mian eksterordinare longan artikolon, mi volas mencii nkoraŭ ion!

Nia cirkulero estas eldonata po 200 numeroj. Ĝin ricevas ĉiu grupo, eĉ multaj izoluloj. Sed, se ni aperigas ian demandon aŭ alvokon venas kutime neniu respondo aŭ pozitiva aŭ negativa.

Tio atestas multkaze pri minimala intereso kaj en multaj kazoj, ke oni la cirkuleron ne legas entute aŭ nur parte.

Se vi ne estis aŭ ne estas kontentaj kun la enhavo de Tagiĝo, skribu pri tio kelkajn liniojn al redakcio kaj plibonigo estus certe farita. Sed kredu, ke vi ne povis atendi pli multe de redaktoro 16-17 jara, kiu komencis eldonadon de Tagiĝo tute sen la spertoj kaj sen via konsilo. Tagiĝo devas esti via gazeto, sed ke ĝi estu tia, tio estas plejparte via tasko.

Eble ankaŭ en tiu ĉi problemo nova jaro alportos la plibonigon.

Je la fino mi volus kiel jam eksredaktoro de centra cirkulero Tagiĝo deziri al tuta nia junulara organizo grandan ekfloron kaj potencigon, por ke mi povu venontjare dum kunsido de delegitoj konstati la rezultoj ankoraŭ plimulte ĝojigan.

Kiel eksdelegito de junularo de Opava mi deziras al vi, karaj samideanoj, brilajn sukcesojn, fratan konkordon, kaj entuziasmon en la nova laboro.

Beligi la venontan laboron mi ne volas. Ĝi certe estos fortostreĉa, sed en la momentoj ĉe komenciĝanta dubado, pripensu denove kaj profunde la sencon de nia klopodo kaj tiel klariginte al vi la esencan problemon, via vojo estas klara kaj malhelpoj plifacile venkeblaj.

Amikoj, ne forgesu, ke vi estas batalantoj de nobla ideo, kies efektiviĝo jam estas proksima

Via Novobilský

Ministro A. NEUMANN en Opava

Venas denove la tempo pli taŭga por aranĝado de esperanto-kursoj. Estas necese plimultiĝi la vicojn de nia Esperantistaro kaj gajni precipe la junularon por nia verda ideo.


Pasis netuta monato kaj ni, Esperantistoj el Opava konsciiĝis ĉi tiun ravan cirkonstancon kaj entuziasme komencis labori kaj varbi novajn adeptojn. Dum kunsidoj de grupa komitato estis decidite eluzi ĉiujn eblajn rimedojn, por ke ni akiru plej brilajn sukcesojn. Ĉi propono estis aprobita ankaŭ de ceteraj klubanoj, kiuj promesis plenan kunlaboron dum varbado de novaj kursanoj. Por akiri tiun celon ni eluzas la personan propagandon, eĉ la propagandon el gazetoj. Ni devis batali por ke la esperanto-artikoloj trovu siajn lokojn en sindikata gazetaro. Sed fine tamen eĉ sur tiu kampo ni sukcesis.

Tre gravaj por ni labor- kaj instinktplenaj estis la vortoj de ministro Dr. A. Neumann, kiu prelegis en Opava pri nova Ĉinio, kaj invitita, kompleze vizitis nian klubojn kaj trarigardis la materialon, t.e. afiŝojn, gazetojn eĉ librojn, kiujn ni el Ĉinio ricevis.

Li estis agrable surprizita, laŭdis kore nian laboron kaj deziris al plua nia laboro multajn sukcesojn.

Entuziasmigita ni komencis la aŭtunan propagandon de nia kara lingvo kaj akiris jam nun atentindajn rezultojn.

Milan Spáčil



Tendarfajro

...Venu al ni, Juna kamarad', sub verda stelo via lok'.....
portas varma vespera aero melodion de la kanto.

Homoj, sidantaj ĉe la granda tendarfajro, kantas ĝin enpenŝiĝintaj, okuloj rigardas en flamojn kaj ĉiuj anime sentas strangecon de la momento. Ĉiujn kunigas vortoj de la kanto, ĉiujn kunigas ideo, ke ili ĉiarn restos esperantistoj, ke ili denove ie kunvenos kaj komune rememoros tendaron, kiu donis al ili novan entuziasmon, novajn geamikojn, kie ili travivis feliĉajn, liberajn tagojn.

Kanto finsonis, neniu parolas. Ĉiuj ankoraŭ same pensas, ke tendaro finiĝos, ke morgaŭ ili ĉiuj veturos hejmen kaj fabelo de naturo, amikeco malaperos. Fine ekstaras junulo kaj ekridante parolas: "Do, samideanoj, ni devas disiri, sed ne por ĉiam. Ni denove renkontiĝos, denove ni kantos nian Junularan kanton, denove ni sentos tion, kion ni sentas nun okaze de nia adiaŭa tendarfajro. Kaj nun ion gajan! Ni kantos Frat' Jakobo!"

Ĉiuj vekigis. Ili estas nun viglaj, kapoj ne kliniĝas. Okuloj ĉirkaŭprenas gekamaradojn, la sento de kunuleco ne malaperas. Vizaĝoj de ĉirkaŭsidantoj pliviviĝis, malĝojon forportis vortoj de knabo kaj ĉiuj kantas gaje kun amo en animo.

Denove ekstaras tiu junulo kaj diras: „Nia tendaro finiĝas, ni foriros kun novaj spertoj, kun novaj fortoj reen en klubojn, ni transdonos ilin al ĉiuj, kiuj ilin bezonas, ni ilin ekuzos por pli bona laboro por Esperanto." Poste li dankis al ĉiuj, kiuj gvidis tendaron, al instruistoj, al samideanoj, kiuj per sia entuziasmo kaj bonhumoro helpis al bona paso de la vivo en tendaro, li dankas al ĉiuj.

Multaj havas larmojn en okuloj, sed ne estas tio larmoj de malĝojo. Ili estas larmoj de dankemo. „Tendaro plaĉis al mi kaj mi forgesos ĝin neniam," respondas al li iu alia. Frazo mallonga diras ĉion.

Flamoj ŝanĝiĝis flametoj, eĉ tiuj malrapide estingiĝas, tra nokto sonas kanto pri steletoj, al kiuj ni deziras bonan nokton kaj rondeto disiras tendojn kun la sama penso: Nur Esperanto povas doni al homoj tian fratecon kaj amikecon, kiun ni nun tiom forte ekkonis.

* Zdeněk Škvřna,
ĉeestanto de Esperanta tendaro 1955

Zápis o celostátní schůzi Junulara v Hradci u Opavy dne 2. srpna 1953

Schůze byla zahájena v 9.45 hymnou esp. mládeže. Potom předseda Junulara J. Werner uvítal všechny zúčastněné delegáty a hosty z celé republiky.

K zpestření programu schůze velmi úspěšně přispěli bratři Klapilovi svým výborně provedeným hudebním vystoupením.

Pak se rřistoupilo k vlastnímu jednání.

S-an Novobilský přečetl zápis a resoluci z poslední schůze Junulara.

Potom se ujal slova předseda Werner, který probíral a hodnotil práci esp. mládeže od poslední celostátní schůze. Vyšel ze situace, která byla v esp. hnutí před rokem. V této době vycházelo několik cyklostilovaných oběžníků. Ústředním oběžníkem byl "Junularo, agu", který měl velmi pěknou úroveň jak po stránce formální, tak i ideové. Bohužel však z Gottwaldova odešlo několik samideánů, a proto oběžník přestal vycházet. Také další oběžníky zanikly, a to z nerůznějších příčin, všeobecně známých. Opava, kde byla situace poněkud příznivější, snažila se zachránit situaci, a začala vydávat nepravdělný Informační list, který se po čase přetvořil v nový oběžník Tagiĝo.

K poslední celostátní schůzi Junulara existovalo 31 skupin, k letošní schůzi je jich 29, to znamená, že počet skupin poklesl. Co do množství členů počet stoupl z 610 na 654. Bylo by však nesprávné posuzovat činnost za oboobí jednoho roku jen podle počtu členů. Máme hodně členů, kteří jsou esperantisty formálními, papírovými. Takové členy nepotřebujeme. Ti nám nepomáhají, ale brzdí nás. Na druhé straně máme hodně esperantistů, kteří se nezapojili do naší organizace, kteří pracují izolovaně, ačkoliv by svými schopnostmi mohli našemu hnutí velmi prospět. Je na nás, abychom tyto lidi získali.

S prací mnoha skupin s-an Werner spokojen není. Někteří delegáti si mysleli, že veškerá jejich práce spočívá v tom, že vyplní zaslané jim Informilo, na které se muselo v mnoha případech ještě 2 měsíce čekat. Takovíto samideáni jistě svou práci nepomohli hodně esp. hnutí. Byli však také samideáni, kteří měli zájem o práci, navázali styky mezi sebou a vyměňovali si zkušenosti.

Tento rok, ce se týká vnějších okolností, nebyl našemu hnutí příznivý. To se také odrazilo v celoroční práci, která nebyla taková, jaká měla být. Proto v příštím roce musíme pracovat více a lépe.

Naše práce musí být napříště ještě lépe organizována. Musíme postupovat společně, aby se naše úsilí netříštilo, a tak neplýtvali zbytečně silami. Každá, i sebelepší myšlenka může zaniknout a být neúspěšná, není-li dobře organizována.

Dále s-an Werner hovořil o propagaci. Musíme stále vhodně propagovat Esperanto. To však neznamená, abychom se zaměřovali na nějaké masové náborů, se kterými nemáme právě nejlepší zkušenosti. Ne množství, ale kvalita a oddanost naší myšlenky.

Musíme se zdokonalovat stále po stránce jazykové, a to jednak v gramatice, ale také nezapomínat na literaturu a historii. Některé naše kluby to bohužel opomíjejí.

Nesmíme rovněž zapomínat na ideovou stránku našeho Esperanta a pustit se s novou chutí a elánem, který je vlastní právě mládí do další práce pro vítězství naší Zelené myšlenky.

Po referátu s-ana Wenera následovaly referáty jednotlivých delegátů:

Svit: Na Slovensku se v poslední době projevila určitá stagnace, zaviněná odchodem vedoucích, ať již na vojnu nebo na studie. Je zde však mnoho nadšených lidí, proto doufejme, že se o Slovensku již v brzké době dovíme radostnější zprávy.

Brno: Schůzky brněnských esperanistů mají velmi vysokou úroveň. Předvádějí se zde různé původní i přeložené esp. hry, mají zde přednášky a zabývají se aktuálními problémy politickými, kulturními i technickými.

Lanškroun: Velmi aktivní skupina. Bylo zde organisováno několik kursů, a přes všechny obtíže, které měli, přivedli mnoho nových, schopných lidí.

Most: Je zde velmi čilá skupina, jedna z nejlepších v republice. Mladí se staršími scházejí se pravidelně 2x týdně. Většina samideánů zde stoprocentně ovládá Esperanto.

Olomouc: V Olomouci máme velmi čilou a aktivní skupinu. Není zde organisováno v pravém slova smyslu Junularo, poněvadž mladí se schází společně se staršími, ale vedou si velmi pěkně. Organisovali zde krajskou schůzi. Několik s-ánů se zúčastnilo LET u Opavy.

Ostrava: Je to jedna ze vzorných skupin, která nám ukazuje jak spolupracovat, jak pomáhat jedni druhým. Udržuje kontakt se všemi Junulary. Sami také zorganizovali krajskou schůzi a "interbabilado".

Praha: Praha nejvíce pocítila všechny těžkosti a potíže, plynoucí ze zrušení esp. organisace. V období od poslední schůze bylo možno pozorovat jakési umrtvení. Mnoho vlivných lidí udešlo, ale vidíme, že těch několika věrných, kdož zůstali, nespí, a snaží se probuditi v pražském Junularu nový život.

Přerov: Zdejší Junularo je příkladem mladé skupiny, která přes všechny počáteční obtíže se nebojí práce a právě tímto svým nadšením dosahuje velmi pěkných výsledků.

Ještě z mnoha jiných míst republiky podali delegáti kratičké informace o situaci svých skupin.

Po těchto referátech nastalo hlasování o nejlepším Junularu, které přineslo tyto výsledky:

Opava 22 hlasů,

Třebíč, Přerov. Olomouc po 2 hlasech,

Tedy nejlepší skupinou pro rok 1953 uznáno většinou hlasů Junularo Opava. Samideán Werner předal zástupci opavského Junulara cenu pro nejlepší skupinu - Fundamenta krestomatío L. Zamenhofa.

Protože s-ano Werner pro nedostatek času nemůže nadále zastávat funkci předsedy esp. mádeže, přistoupilo de k volbě nového předsedy.

Návrhy: Kyselý, Křenek, Sukačová, Solnický.

Výsledek volby: Kyselý 11 hlasů,

Solnický 5 hlasů

Sukačová a Křenek po 2 hlasech.

Vetšinou hlasů tedy zvolen s-an Kyselý . Ten však odmítá přijati tuto funkci. Jako důvod udává naprostý nedostatek času a zdravotní stav. Rovněž s-ani Křenek, Solnický a Sukačová odmítli tuto funkci přijmouti. Objevily se nové návrhy: s-áni Novobilský, Kuzníková se svým bratrem, který se má vrátit z voj. služby.

Nastala velmi čilá diskuse, ve které všichni kandidáti z různých příčin odmítají přijati funkci předsedy.

Konečně četař Dr. Kočvara podává návrh, aby vedení esp. mládeže v ČSR bylo v Opavě, jelikož několik členů tohoto Junulara bylo na tuto funkci navrženo, a také protože je to pro letošní rok nejlepší. Tento návrh byl všemi schválen, a rozhodnuto, že i pro příští roky vždy nejlepší skupina bude kolektivním vedoucím esp. mládeže, Předseda této skupiny – předsedou celostát. výboru.

Tato velmi rušná schůze esp. mládeže v ČSR byla ukončena hymnou ve 13 hodin.

Konkurso

En la sekvantaj numeroj de Tagiĝo vi ĉiam trovos la paĝon, dediĉitan al esperanto-konkurso, kies celo estos konatigi junajn esperantistojn demandforme kun historio, literaturo kaj gramatiko esperantista. Ĝi estos ne malfacila. Redakcio de Tagiĝo atendas, ke multaj esperantistoj ne nur tralegos ĉi tiun paĝon, sed ankaŭ skribos al ni sian solvon kaj opinion. Ĉi tiu konkurso estas parto de granda konkurso, aranĝita laŭ la decido de lasta kunsido de delegitoj el Opava.

Premion gajnos la grupo, kies anoj plejmultnombre partoprenos la konkurson. Ni kompreneble taksos ankaŭ unuopajn responditajn demandojn.

Do ne forgesu kaj sub la nomo de konkursanto alskribu la nomon de grupo, kies membro vi estas!!

Jen la demandoj:

1/ Ĉu ekzistas en ČSR ia esperanto-muzeo? Kie?

2/ Post longa migrado sur dorna la voj',
minacis nin ondoj de l'maro;
Sed venkis ni ilin kaj velas kun Ĝoj'
al verda haven de l'homaro.

Post longa batalo maldolĉa turment,
la stala standardo jam flirtas en vent'.

Demando estas: Kiu estas aŭtoro do ĉi tiu bela, originala poemo, kies dua strofo estas supre citata?

3/ Kiel refuti la riproĉon, ke esperanto volas anstataŭi la naciajn lingvojn?

4/ Kiu plej trafe tradukas en esperanton kaj el esperanto en ĉeĥan sekvantajn frazojn:

a/ Tak dlouho se chodí se džbánem pro vodu, až se ucho utrhne.

b/ Preferinde enziĝi ol bruliĝi.

5/ Kian signifon havas por Esperantisto la nomo: Boulogne sur Mare.

La solvitan unuan parton de konkurso sendu al adreso:

Jaroslav Kuzník

Opava, Rooseveltova 17

Informoj

OPA VA RAPORTAS:

Nian paĝon de lokaj raportoj ni komencas per la raporto de junularo Opava, kiu estis premiita okaze de tutŝtata konferenco en Hradec ĉe Opava kiel la plej aktiva kolektivo el ĈSR. Fragmento de la prezentita de delegito V. N.:

".. Post lastjara sukcesa aranĝo de tendar-lernejo en Žimrovice nia 20-ana Junularo daŭrigis la viglan laboron. Aŭtune komencis 2 kursoj por komencantoj kaj por progresintoj, ambaŭ gvidantoj estis anoj de nia grupe.

Reprezentantoj de niaj grupoj partoprenis preskaŭ ĉiun entreprenon esperantistan. Nome la regionan konferencon en Kopřivnice, 2 foje en Ostrava, en Olomouc kaj en Přerov. Okaze de interbabilado en Ostrava ni prezentis tendaran filmon, kaj vekis tiel interesan pri esperanta lernejo en naturo.

Decembre ni instalas en kult. domo la ekspozicion "Klasbatalo tutmonda", prunteprenitan de s-ano Burda. Ĝi vekis sufiĉe grandan eĥon. Partoprenis 500 personoj. Samtempe kun la malfermo de la ekspozicio okazis la regiona konferenco en Opava.

Dum la tuta jaro ni eldonis la bultenon Tagiĝo, kiu ek de la oktobro 1952 fariĝis centra cirkulero de Esperanto-Junularo en ĈSR. Dum junio, julio kaj aŭgusto ĝi pro teknikaj kaŭzoj ne povis aperadi. La ĉefa tasko kaj celo de Tagiĝo estis publikigi la lokajn raportojn de delegitoj. Redakcio dankas al kelkaj delegitoj, kiuj plenumadis sian taskon pro ilia kunlaboro, sed bedaŭrinde multajn kaj multajn delegitoj plenumadis sian devon aŭ neregule aŭ entute ne! Mi esperas, ke en nova numero de Tagiĝo aperos pli multaj raportoj ol ordinare estis. El la plu agado mi volas mencii la aranĝon de la 2. somera lernejo en naturo, ĉijare dividita je du partoj.

Eble ĉi kurso estis valora helpo per pli intua kunlaboro de junularaj grupoj en nia respubliko. Krom la poresperanta laboro ni devis kompreneble labori ankoraŭ aliel se ni volis ekzisti. Nia rondeto estas unu el la rondetoj de Kleriga kunularo en Opava. Ni reprezentas la organizan servon de K.K. kaj prizorgas la organizan certigon de la koncerton kaj similaj entreprenojn.

Pro tiu kunlaboremo ni estis plene subtenataj en nia laboro, - ni ricevis propran klubejon kun ĉiu komforto. Ni rekomendus al ĉiuj gesamideanoj agi simile /kompreneble laŭ ebleco/ ankaŭ en aliaj lokoj aŭ urboj.

Ankaŭ dik amikaj vortoj de ministro A. Neumann diritaj al ni antaŭ la estro de K.K. firmigis nian pozicion. Varbado de novaj anoj bone progresas; ni uzas afiŝojn eĉ personan influon.

Ĉar en kua junularo foriros atuti en Olomouc kaj Praha 4 aktivaj samideanoj - s. R. Gill, M. Havlická, Fixlay, s. Novobilský, ni preparis por sabato, la 26-an de septembro malgrandan intiman vespereton kun granda kultura programo kaj dancado.

La nomitaj forirontoj deziras al sia ŝatata grupo sukcesan laboron.

V. Novobilský

Doslov k naší 2. letní esp. škole v přírodě

Vracím se znovu k naší esp. škole v přírodě, abych poděkoval těm, kteří se za její zda přičinili.

Chci poděkovat celému opavskému Junularu, jehož členové své volné chvíle věnovali na přípravné práce. Lví podíl má technická družina vedená s. Krásným, Karašem a Gebauerem.

Letošní esp. škola měla své speciální poslání: vychovat nám nové vedoucí, kteří by vedli naše skupiny s plnou zodpovědností. Proto systém učení byl poněkud odlišný, jak jsme tomu zvyklí na jiných esp. školách. Kromě normálního vyučování pořádali jsme různé přednášky a co hlavně, v druhém turnusu jsme rozebírali činnost jednotlivých skupin a tím si ozřejmili, čeho se musíme vyvarovat, aby naše činnost byla úspěšná.

Velmi cenným byl pro nás i rozbor práce v klubech, funkce vedoucích kroužků, jejich odpovědnost a vztah ke kolektivu.

Tyto úkoly jsme mohli zdárně vyřešit jen s pomocí s. instruktorů – Wenera, Kyselého i Neuwirhta, jimž zde chci upřímně poděkovat.

Srdečné díky patří i samideanu profesoru Koženému z Kutné Hory, který nelitoval námahy, aby přijel k nám a uspořádal nejen velmi cenné a poučné přednášky, ale připravil nám také několik krásných kulturních večerů.

Nemalý podíl na úspěchu tábora mají nesporně také naše kuchařky, pí. Pustková a pí. Jůrková, které nám připravovaly chutná jídla v takovém množství, že někteří zúčastnění samideáni přidali na váze o 3 kg. To je jejich nejlepší vysvědčení. Jménem všech účastníků jim mnohokrát děkuji.

Draží přátelé, touto školou jsme chtěli naznačit všem našim mladým skupinám nové cesty a způsoby, jak vychovávat odpovědné funkcionáře. Věříme, že příštím rokem již nebude naše letní esp. škola ojedinělá, ale že budou organisovány další nejméně se stejným úspěchem jako ta naše.

J. Solnický .

Kien plu?

Vi lernis /lernas/ Esperanton. Sendube vi ankaŭ intencas pliperfektigi en tiu lingvo kaj serĉas ĝustan vojon, kiu kondukos vin al la celo.

Sed dumvoje vi renkontas diversajn barojn, kiuj malhelpas vin. Unu el ili estas la fakto, ke mankas ĉe ni studiloj de Esperanto.

Tiun plendon ni aŭdas de diversaj flankoj, ne sole de niaj instruantoj kaj kursanoj, sed ankaŭ de la interesiga publiko. Bedaŭrinde tiu manko ne estas nun forigebla.

Kio mankas al ni?

Ĉiuspeca studmaterialo: lernolibro por komencantoj, studlibro por progresintoj, ambaŭlingvaj kaj fakaj vortaroj, lernilo de stilo, legolibro, modela frazlibro, gvidilo pri korespondado k. s .

Por fariĝi bona esperantisto ne sufiĉas nur ellerni la lingvon. Estas necese precipe por la estontaj kursgvidantoj, profunde koni la historion de Esperanto, la ĝeneralan kaj enlandan movadon, la metodojn de lingva-instruado kaj multajn aliajn sciojn.

Kie vi, nova kaj juna samcelano, konatiĝos kun ĉio? Kiu aŭ kio helpos vin?'

Plej unue necesas, ke vi diligente legu, legadu niajn gazetojn, kaj la ĉefajn, tutmondajn, kaj la niajn. Tie vi trovos neelĉerpeblan fonton de gravaj dokumentoj el Esperantujo. Vi admiros fidelan kaj en la pasinta tempo ofte tre malfacilan laboron de niaj pioniroj.

Kiamaniere vi perfektigos en la lingvo?

Unue kaj ĉefe: per legado kaj studado de verkoj de nia Majstro kaj du pluraj modelaj stilistoj.

Due: neniam forgesu, ke la Fundamenta Ekzercaro /vi ja konas ĝin, ĉu?/ al kiu oni tute ne

povas atribui literaturan valoron, estus konstanta bazo por la praktika uzo de Esperanto.

Trie: se eblas al vi, uzu kaj studu nian plej fidindan "Plenan vortaron", malgraŭ tio, ke ĝi ne estas oficiala, t.e. ne aprobita de sia lingva institucio /Akademio/.

Vian seriozan atenton meritas la verkoj de niaj ĉeĥaj esperantistoj, iliaj fame konataj tradukoj (ne forgesu la Ĉeĥoslovakajn antologiojn) kaj originala prozo kaj poezio. Legante la tradukon paralele kun la gepatra lingvo, vi pliriĉigos vian scion per novaj esp. kaj frazturnoj. Ĉiam legu kun kraĵono en la mano, notu ĉion atentindan!

Sed konsciu, ke ne ĉio, per kio la Esperanta literaturo vastiĝas, ankaŭ riĉigas ĝin - kaj vin. Nur per la legado de niaj klasikuloj vi akiros veran "spiriton de li lingvo".

Tion konsilas mi - sed vi prave demandos: Kiel legi, kiel studi, se preskaŭ ĉio estas malhavebla por ni?

Espereble certan studmaterialon vi havas en via grupo - se tia ne ekzistas, klopodu serĉi rilatojn kun alilokaj samideanoj. Partoprenu en la regionaj konferencoj kaj kunvenoj de nia Esperanto-Junularo, tiam vi tutcerte trovos apogon en via strebado.

Nepre aliĝu al la Esperanta Junularo! Ne velu esti kaj resti izolulo! Laŭeble ariĝu ĉirkaŭ vi novajn adeptojn, mem fariĝu ilia konsilanto! Tiel vi plifortigos vian sperton kaj ankaŭ vian organizon.

Legu, multe legu en Esperanto kaj parolu en ĝi! Ne traduku senvaloran tekston, ne traduku poemojn kaj kantojn! Ne sopiru tuj esti Esperanta verkisto!

La moko de viaj indiferentaj kamaradoj ne fortimigu vin.

Neniu povas antaŭvidi la estonton. Tamen kalkulante jam 66 jarojn de Esperanto, jarojn kiuj estis plenigitaj per grandega laboro, ni povas kredi je fina venko. Vi, niaj junaj samideanoj, sciu, ke la estonteco de Esperanto estas en viaj manoj.

Julio Šupichová.